

Heinrich Heine,
Kie, laca vagabondo

tradukita de Kálmán Kalocsay

Kie, laca vagabondo,
trafos mi al lasta hejm' ?
Ĉu sub suda palmofrondo?
Sub tilio apud Rejn' ?

Ĉu min en dezert' enfosos
haste ies fremda man',
aŭ en sablo mi ripozos
borde de la ocean' ?

Kie ajn! Min la ĉieloj
brakos, kiel tie ĉi,
kaj funebro-lampe steloj
ŝvebos nokte super mi.

*Traduko de la Germana poemo "Grabspruch" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 – †1976).*

Arg-63-1083 (2010-05-26 19:45:24)

Heinrich Heine,
Tombosentenco

tradukita de Manfredo Ratislavo

Kie estos ripozejo
lasta de migranto mi?
Ĉu sub palmoj en forejo?
Aŭ ĉe l' Rejno sub tili' ?

Ĉu enfosos min malpie
iu en dezerta land' ?
Aŭ ĉu mi ripozos ie
en la sablo de marstrand' ?

Tamen, min ĉirkaŭos ĉie
la ĉiel' de l' granda Di',
steloj tie ĉi kaj tie
lampe ŝvebos super mi.

*Traduko de la Germana poemo "Grabspruch" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1993.*

MR-261-1c / Arg-63-123 (2010-05-26 19:44:33)